Fine, mi tre dankas al la urbo de Sorio kaj al la urbestro Carlos Martínez, al la asistanto Gustavo Encabo kaj al la skabenoj de la urbodomo por faciligi al ni multajn aferojn de la kongreso.

Mi esperas, ke la aliaj kongresanoj povos ĝui la kongreson kaj povos trovi ĉi tie motivojn por reveni estontece.

PROVIZORA PROGRAMO, 83-a HISPANA ESPERANTO-KONGRESO, SORIO, MAJO 2025

| ĴAŬDO 1-MAJO | | | | | |
|-----------------|---|---|---|--|--|
| HORO | VESTIBLO | SALONO | ĈAMBRO 1 | ĈAMBRO 2 | EKSTERE |
| 10,00-10,50 | Akceptado Libroservo | | | | Libera konatiĝo kun la urbo |
| 11,00-11,50 | | | | Programero 1. Filmofestivalo (1) | |
| 12,00-12,50 | | | Prezentado de. Ekspozicio | | |
| 13,00-13,50 | | Prelego 1. Eŭheno Kovtonjuk | | Prelego 2. Iván García | |
| 14,00-17,00 | MEMZORGA MANĜOPAŬZO | | | | |
| 17,00-17,50 | Akceptado Libroservo | Prelego 3. Natxo Apaolaza | Kurso | Prelego 4. Pako Belmonte | |
| 18,00-18,50 | | Laborsesio 1. Fundación Esperanto | | Prelego 5. Eduardo Berdor | |
| 19,00-20,00 | | | | | Interkona vespero kun partoprenantoj |
| VENDREDO 2-MAJO | | | | | |
| HORO | SALONO | ĈAMBRO 1 | ĈAMBRO 2 | EKSTERE | |
| 10,00-10,50 | Solena malfermo | | | | |
| | Komuna foto | | | | |
| 11,00-11,50 | Ĉefprelego: Antonio Valén | | | | |
| 12,00-12,50 | Programero 2. Prezento de libroj (1) | | Prelego 6. Félix Jiménez | | |
| 13,00-13,50 | Prelego 7. Laura Brazzabeni | | Prelego 8. Miguel Á. Sancho | | |
| 14,00-17,00 | MEMZORGA MANĜOPAŬZO | | | | |
| 17,00-17,50 | Prelego 9. Miguel G. Adúriz | Kurso | Prelego 10. José M ^a Salguero | | |
| 18,00-19,00 | Programero 3. | | Programero 4. | | |
| 19,00-20,00 | Kvizo | | Filmofestivalo (2) | | |
| 20,00-22,00 | MEMZORGA MANĜOPAŬZO | | | | |
| 22,00-24,00 | | | | | Koncerto de JoMo |

| SABATO 3-MAJO | | | | |
|---------------|------------------------------------|--|----------------------------------|--------------------------|
| HORO | SALONO | ĈAMBRO 1 | ĈAMBRO 2 | EKSTERE |
| 10,00-10,50 | (teknika pretigado) | Ĝenerala kunsido de HEF + Omaĝo Urueña | | Ekskurso al Numancia |
| 11,00-11,50 | Programero 5. Prezento de libroj 2 | Laborsesio 2. Nova apo | Programero 6. Filmofestivalo (3) | |
| 12,00-12,50 | Prelego 11. Rafaela Urueña | Programero 7 | | |
| 13,00-13,50 | Prelego 12. Abel Montagut | Laborsesio 3. Informadiko | | |
| 14,00-17,00 | MEMZORGA MANGŔOPAŬZO | | | |
| 17,00-17,50 | (provludo) | Kurso | Prelego 13. Toño del Barrio | |
| 18,00-19,00 | Poezia vespero | | | |
| 19,00-20,00 | | | | |
| 20,00-22,00 | MEMZORGA MANGŔOPAŬZO | | | |
| 22,00-24,00 | | | | Koncerto de Kaj Tiel Plu |

| DIMANĈO 4-MAJO | | | | |
|----------------|---|--------------|----------------------------------|----------------------|
| HORO | SALONO | ĈAMBRO 1 | ĈAMBRO 2 | EKSTERE |
| 10,00-10,50 | Prelego 14. Encarna Teruel | Laborsesio 4 | Programero 8. Filmofestivalo (4) | Ekskurso al Numancia |
| 11,00-11,50 | Prelego 15. M. Redulez, K. Pomirol | Prelego 16 | | |
| 12,00-12,50 | Programero 9. Spektaklo | | | |
| 13,00-13,50 | Solena fermo | | | |
| 14,00-17,00 | KOMUNA BANKEDO | | | |
| 17,00-20,00 | Libera tempo por mem malkovri la urbon... ...kaj ĝis la venonta!!! | | | |

| LUNDO 5-MAJO | |
|--------------|--|
| 9,00-20,00 | Tut-taga ekskurso al Burgo de Osma. Komuna tagmanĝo |

KULTURAJ PROGRAMEROJ:

Ĉefprogramero – Poezia vespero. Omaĝo al María Ángeles Maeso. Gvidas: Miguel Fernández

Ekspozicio: prezentado

Prezento de noveldonitaj libroj

Festivalo de subtekstigitaj filmoj

Kvizo

Koncerto de JoMo

Koncerto de Kaj Tiel Plu

PRELEGOJ:

Ĉefprelego – Antonio Valén: Pri poemo de Machado

Prelego 1 – Eŭheno Kovtonjuk: Valoraĵoj sen daŭro de uzebleco.

Prelego 2 – Iván García: BitArkivo.org: Konservado kaj Alireblo de Ciferecaj Dokumentoj

Prelego 3 – Natxo Apaolaza: Prezento de du asocioj kiuj laboras por kaj per Esperanto, Esperanto plus, kaj IKEL.

Prelego 4 – Pako Belmonte: La taŭrofelo, geometrio kaj bildigoj de la duoninsulo

Prelego 5 – Eduardo Berdor: Franclingva muziko en Kanado.

Prelego 6 – Félix Jiménez: Sep jaroj de kursoj de Esperanto en UNED: Bilanco

Prelego 7 – Laura Brazzabeni: Luigi Pirandello, eterna Nobel-premio: inter fragmenta identeco kaj la nova limo de Esperanto.

Prelego 8 – Miguel Ángel Sancho: Analoga fotografio: oldema modo aŭ arta tendenco?

Prelego 9 – Miguel G. Adúriz: La Belartaj Konkursoj de UEA

Prelego 10 – José M^a Salguero: Portugalio en la Hispana Enlanda Milito

Prelego 11 – Rafaela Urueña: Porpaca agado en Unuiĝintaj Nacioj

Prelego 12 – Abel Montagut: Abelaj projektoj: Odiseado verse, Tirant lo Blanc, kaj aliaj

Prelego 13 – Toño del Barrio: La fizika Esperantujo

Prelego 14 – Encarna Teruel: La integrita psikopato

Prelego 15 – Marcelo Redulez, Klodin' Pomiro! Aristides de Sousa Mendes, justulo inter la nacioj.

Prelego 16 (konfirmota)

LABORAJ PROGRAMEROJ:

Laborsesio 1 – Fundación Esperanto: Lorenzo Noguero

Laborsesio 2 – Informadikaj projektoj de HEF: Miguel Ángel Sancho

Laborsesio 3 – Nova apo “Voludi”: Antonio Alcázar

Laborsesio 4 (konfirmota)

KONTAKTO

Sekvu la novaĵojn en la retejo: <https://kongreso.esperanto.es/>. Por ajna informo skribu al kongreso@esperanto.es.

Estis malfermita Telegramkanalo: <https://t.me/HispanaEsperantoKongreso>, kiu taŭgas por ricevi ĝisdatiĝojn de la organizado, kaj por ke kongresanoj povas interkomunikigi



PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

EKSPOZICIO, PRELEGO KAJ KURSO EN SEGOVIO

La Segovia Esperanto-Asocio, la plej juna el la Esperanto-kluboj en Hispanio, tre altnivele komencas sian agadon. Post aktivado ĉe La Granja fine de la pasinta jaro, en februaro kaj marto ĝi organizis ĝis tri aktivadojn en la Publika Biblioteko de la provinca ĉefurbo.

Jen la planitaj eventoj:

* Ekspozicio: "Esperanto: de Utopio al Realo", montrita de la 3-a de februaro ĝis la 31-a de marto en la Publika Biblioteko de Segovia (C. Los Procuradores de la Tierra, 6).

* Prezenta prelego, kun sama titolo, la 7-an de februaro, je la 19-a horo samloke, kiun gvidis José Antonio del Barrio, direktoro de la Fondaĵo Esperanto, kaj Miguel Fernández, verkisto kaj tradukisto en Esperanto.



* Enkonduka kurso de Esperanto, komenciĝanta la 12-an de februaro, ĉiujn merkredojn de februaro kaj marto, gvidita de David Trigo, kun sufiĉe bona akceptado.

Multaj amaskomunikiloj eĥis la kunvokon, kun intervjuoj al David kaj Laura en la loka televido, en radiostacioj kaj gazetaro; vidu ekzemple la ampleksan raporton en “El día de Segovia” ĉe: <https://bitoteko.esperanto.es/xmlui/handle/11013/7397>.

NOVA VERSIO DE LA EKSPOZICIO PRI ESPERANTO

Hispana Esperanto-Federacio ĝisdatigis sian ekspozicion pri Esperanto, kiu estis montrita en multaj urboj sub la nomo "Esperanto, lingvo kaj kulturo".

La nuna versio estas refasonigo kaj plibonigo de la antaŭa, kun novaj informoj ĝisdatigitaj kaj alia aspekto. Ĝi plu konsistas el 15 afiŝoj de 100 x 70 cm. La diversajn aspektojn de la lingvo kaj la movado oni ilustras per tekstoj en la hispana kaj pluraj bildoj. Vi povas vidi la panelojn kaj ĝian aspekton en tiu ĉi ligilo: <https://bitoteko.esperanto.es/xmlui/handle/11013/7377>.



La paneloj estis ekspoziciataj unufoje en la Publika Biblioteko de Segovio, kun la titolo "Esperanto, de utopía a realidad". Por la prezo de la ekspozicio en la urbo Segovio, oni kreis spacialan afiŝon ekster la ĝenerala kolekto kun la titolo: "El esperanto en Segovia", kaj oni ankaŭ inkludas fizikan materialon por ilustru diversajn

aspektojn de la lingvo.

La ekspozicio estas disponebla por ĉiuj grupoj kaj aktivuloj de Hispanio, kiu deziras konigi la lingvon en sia urbo. Sufiĉas kontakti Hispanan Esperanto-Federacion por scii ĉu ĝi disponeblas en la dezirataj datoj.

La comunicación internacional

A lo largo de la historia, la humanidad ha buscado siempre una lengua puente por razones prácticas. Los ritmos económicos y culturales de cada época han dictado el uso de distintas lenguas en las relaciones internacionales (sumero, chino, griego, latín, francés...). En la actualidad el inglés ha alcanzado una posición más amplia y dominante que todas sus predecesoras, pero a costa de discriminar a quienes no lo tienen como lengua materna, lo que crea desigualdades en la comunicación internacional.

Restringir la comunicación internacional a unas pocas lenguas beneficia a unos pocos, y desfavorece a muchos, perpetuando brechas sociales y culturales. Cuando una sola lengua nacional, normalmente el inglés, actúa como lengua franca, aumenta el desequilibrio a favor de una minoría que ya parte con ventajas. En cambio, el esperanto permite una comunicación internacional más justa y que requiere menos esfuerzo, tiempo y dinero. Es un idioma neutral que no discrimina a nadie y ofrece resultados más equitativos que cualquier otro idioma extranjero. Su diseño facilita el aprendizaje y fomenta un intercambio igualitario entre personas de diferentes culturas.

Esta exposición pretende ser una introducción al esperanto y su cultura. No agota ninguno de los temas tratados pero es un punto de partida para que el visitante interesado pueda después informarse por su cuenta en profundidad.

Bonvenon!

Reber sala

UMBERTO ECO
La invención de la lengua perfecta

HISTORIEROJ EL ALIA VIDPUNKTO

Spite siajn magrajn fortojn, SATeH denove plenumis projekton konsistantan en traduko de hispanlingva verko, nome “Contigo empezó todo” de Eduardo Pérez, kolekto de gazetartikoloj publikigitaj en hispana gazeto "El Salto". Per malpeza tono la aŭtoro klopodis por elekto de gravaj momentoj de la historio de Hispanio unue emfazante la epizodojn per kiuj la regantaj klasoj decidis monotonigi la hispanan socion malprofite al diversaj etnoj kaj kulturoj por pli facile regadi la popolon. Poste, en modernaj etapoj li dediĉis sin al barakoj cele al luktado por pli justa mondo, kio plej ofte rezultis en subpremado, malfacilaĵoj kaj maljustaĵoj. Tio ege kontrastas kun pli oficialaj alrigardoj al la Historio, dum tre ofte la elanoj de normalaj homoj markas la veran historion en ilia nivelo de normaluloj, for de la medioj de generaloj, parlamentanoj, regantoj ktp.



La laboro de la teamo de SATeHanoj, helpitaj de aliaj esperantistoj, kaj aparte de SATanoj, montris, ke la kolektivemo vere funkcias. La verko de Eduardo Pérez tradukiĝis kiel “Historieroj el alia vidpunkto” por montri pli bone la menciitajn verkocelojn. Tradukis dekomence Kani; provlegis poparte Tonjo, Felikso, Manolo kaj Kardo; perlupee kontrolis la tuton nehispanlingvanoj Gary Mickle kaj André Arnold. Liven Dek zorgis pri la kovriloj kaj klapoj; Ana pri la leĝaj demarŝoj, Manolo pri presado kaj distribuado. Do, tute laborema kaj kolektivema teamo.

La libro vendiĝas je la atingebla prezo de dek eŭroj, kaj tiuj kiuj pretos helpi en distri-
buado ricevos rabaton de triono de la vendoprezon (kvina aŭ pliaj ekzempleroj). Plej
verŝajne baldaŭ elĉerpiĝos la disponebla stokoj, ĉar vere la enhavo allogas kaj la legado
estas komforta, konsiderinte la strukturon de apartaj epizodoj.

Eble situacioj okazintaj en la teritorio kiu nun estas nomata Hispanio povas helpi la
leganton kompreni popolajn historiojn de aliaj landoj. Kompreneble nek la verkisto
mem nek la teamo de eldonistoj en Esperanto intencis proponi akademian verkegon
kun abunda referencaro al historiistoj, amaso de informoj pravigaj ktp., sed nur agra-
blan legaĵon kiu almenaŭ apartiĝu de seriozegaj historiaj analizoj.

Tiu malpezeco eble helpas nehispanojn kompreni tiun rigardon al la hispana historio.
Ĉiokaze oni helpas per vortareto je la fino de la libro kaj kun truditaj klarigoj en la
teksto mem.

Ni esperas, ke kaj hispanoj kaj nehispanoj ĝuos la legadojn, eklernos pri kelkaj nekona-
taj epizodoj, kaj ĉefe meditos pri kia devu esti la itinero kaj la klopodoj por pli bona
mondo. Sanon kaj liberon.

La eldonteamo

KASTELO DE GREZILJONO



La franca esperantista kastelo Grezil-
jono invitas al siaj kursoj en 2025:
2025-apr-18/27: PRINTEMPAS, in-
tensivaj kursoj por ekzamenoj kun 4
famaj instruistoj: gresillon.org/p
2025-jun-30/jul-10: Maratona Espe-
ranto-kurso kun 3 instruistoj, ankaŭ
por blinduloj, kun Internacia E-
Konferenco: gresillon.org/m
2025-aŭg-24/29: Verda Naturisma
Semajno kun E-kursoj: gresillon.org/n
2025-okt-24/nov-02: AŬTUNAS,
kursoj kaj FEI-ekzameno kun René
Triolle: <https://gresillon.org/au>
Agendo de la sekvaj agen-
d o j : gresillon.org/a -
kontakto: kastelo@gresillon.org

.DOKUMENTOJ ALVENINTAJ AL LA BIBLIOTEKO EN 2024

Dum la jaro 2024 alvenis al la biblioteko jenaj titoloj:

Donacinto: Sveda Esperanto-Federacio

Vilborg, Ebbe. *Etimologia vortaro de Esperanto. Vol. 1-3, 5*. Eldona Societo Esperanto, 1989-2001

Lindgren, Astrid. *Mio, mia filo*. Eldona Societo Esperanto, 2006

Vizaĝoj : novelaro 2000-2009. Eldona Societo Esperanto, 2010

Donacinto: Benoît Philippe

Alfabela katalogo de la Saksa Esperanto-Biblioteko. IV Volumo. Sächsische Esperanto-Bibliothek, 2024

Donacinto: José Vicente Castillo García

Castillo García, José Vicente. *Una estrella verde en las trincheras*. Ayuntamiento de Cheste, 2022

Donacintoj: Ana Maria Ferrer kaj Janez Zadavec

Bonte, Mojiceja. *Alma: la mondo antaŭ la hejma sojlo*. Osrednja Knjižnica Celje, 2021

Donacinto: Manuel Parra

Sir', Serĝo. *Ĉe la lago : kroniko pri la ĉiutaga vivo en Anci'*. SAT-Amikaro, 2013

Grobe, Edwin. *Perua venĝo*. Arizona Stelo, 1994

Donacinto: Ana Manero

Volontuloj kun okulvitroj. SAT en Hispanio, 2024

Donacinto: Daniel Barroso

Fratoj Grimm. *Neĝulino kaj aliaj fabeloj*. Sennacieca Asocio Tutmonda, 1939

Donacinto: Anonima

82-a Hispana Kongreso de Esperanto (kongreslibro)

Bronŝtejn, Mikaelo. *Ĉirkaŭ la literaturo*. La KancerKliniko, 2024

Akiritaj de HEF

Perrault, Charles. *Cindrulino, La belulino dormanta kaj aliaj rakontoj*. Asociació Cultural Ĝuo, 2023

La plej danĝera besto. Asociació Cultural Ĝuo, 2023

Libro de aktoj de la grupo Nova Semo de Reus : 1911-1918. Toni Espinosa, 2023

Trovu ĉi tiujn kaj aliajn dokumentojn en la retkatalogo de Biblioteko Juan Régulo Pérez: <https://bibliotekojrp.esperanto.es/>

Ana Manero

LA 81-A IJK EN INDONEZIO:

eskapu hispanan someron por ĝui alian tipon de varmecco

TEJO invitas vin al la 81-a Internacia Junulara Kongreso (IJK), kiu okazos de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2025 en Cisarua (Bogor), Indonezio. Malgraŭ la nomo “Junulara”, neniam oni estas tro maljuna por ĉeesti, ĉar IJK ĉiam estas malfermita al homoj de ĉiuj aĝoj, kontinentoj, kaj lingvoniveletoj. La retejo estas ijk2025.tejo.org.

Ni kongresos en Alfa Resort Hotel and Conference en Cisarua (Bogor), ĉirkaŭ 75 kilometrojn sude de la ĉefurbo Ĝakarto. Kune ni troviĝos inter neaktivaj vulkanoj, kiuj ofertas al ni impresan pejzaĝon kaj kie la klimato estos milda kaj agrabla, ĝuigante al ni la tropikan etoson sen varmegaj temperaturoj. Dum la semajno vi komforte loĝos kontraŭ malaltaj prezoj kiuj jam inkluzivas ĉiujn manĝojn.

La kongresa temo estos “Diverseco, solidareco, kaj toleremo,” ni kune esploros la kulturen kaj lingvan diversecon de Sudorienta Azio, meditos pri la defioj de tiu diverseco, kaj pensos pri konkretaj solvoj per kunlaboro inter homoj de malsamaj landoj kaj generacioj. Dum la tago vi spertos vastan gamon de kulturaj, lernigaj, kaj sportaj programetoj. Vespere, vi gustumos la mondon dum la Trinkomanĝa Nokto kaj aŭskultos la talenton de lokaj kaj internaciaj artistoj. Nokte, dancu, trinku teon, aŭ kantu en nia karaokoo, laŭ via plaĉo. Kompreneble, vi mem povas kontribui al la programo!

Ĝis la 10-a de marto aliĝis al IJK 96 homoj el 31 landoj, inter kiuj la plej multaj venas el Indonezio (18), Filipinoj kaj Vjetnamio (po 7), D.R. Kongo kaj Orienta Timoro (po 6). El Hispanio aliĝis kvar homoj, sed ni esperas, ke ĝi daŭre supreniros en la listo kun la aldono de multaj pliaj el vi legantoj. Ĉu vi aldoniĝos? Senhezite ĉe mallonge.net/ijk2025.

Azien, Indonezian! Ĝis baldaŭ en Cisarua!

La Fonduso “Partoprenu IJK-n” bezonas vian kolektivitan subtenon



CISARUA 2025

Karaj hispanaj samideanoj, ekde la lasta IJK antaŭ 13 jaroj en Sudorienta Azio (Hanojo, 2012), multaj junaj aktivuloj aperis sur nia movada mapo, ne nur en Indonezio, sed ankaŭ en Filipinoj, Orienta Timoro, kaj aliaj landoj. Tiuj aktivuloj profitus de la spertoj kiujn IJK donas al siaj partoprenantoj: trejnadaj, konstruado de kunlaboroj, interŝanĝo de spertoj, ktp, sed sur la vojo ni alfrontas altan baron: multaj ne disponas pri financaj rimedoj por vojaĝi kaj ĉeesti.

En Azio kaj Oceanio, moviĝeblo ne estas tiel facila, kiel en Eŭropo, kaj tre malofte okazas internaciaj junularaj E-renkontiĝoj. La ĉi-jara IJK estas malofta ŝanco por ke niaj aktivuloj en tiu regiono sentu, ke ili vere apartenas al nia internacia komunumo. IJK 2025 venas kiel nemaltrafebla okazo por investi en la nuntempa kaj estonta generacioj de nia movado.

Ni invitas vin subteni la fonduson “Partoprenu IJK-n”, per kiu TEJO ĉiujare ebligas la partoprenon de junuloj el diversaj mondopartoj. Ĉi-jare, ni lanĉis specialan donackampanjon, en kiu ni celas kolekti €8.000 por venigi 20-25 junulojn el diversaj landoj, precipe de Azio kaj Oceanio. Eĉ eta subteno via multe helpas. Krome, por pliproksimiĝi al tiu celo, ankaŭ Universala Esperanto-Asocio (UEA) donacos €1 por ĉiu €1 kiun vi donacas.

Por subteni, vi povas ĝiri vian donacon al nia UEA-konto “ijkb-b” indikante “PPIJK + [Via Nomo, Lando aŭ ‘Anonima]” aŭ per aliaj metodoj (karto, banka ĝiro aŭ Paypal). Informoj ĉe ijk2025.tejo.org/kiel-donaci. Koran antaŭdankon pro via donaco!

Albert Stalin Garrido

SUKCESA KONKURSO EN CHESTE

De la 5-a ĝis la 8-a de septembro 2024, okazis en **Cheste** la *82-a Nacia Kongreso de Esperanto*.

Samtempe kun tiu evento, la *Kultura Societo “Ateneo La Alianza”* de Cheste, kunlabore kun la *Urbodomo de Cheste*, la *Fondumo Cajacheste* kaj la Esperanto-grupoj de Valencio kaj Cheste, anoncis la *II-an Internacian Konkurson “Francisco Mañez”*, sub la slogano *“Konkurso de ideoj por la diskonigo kaj evoluigo de Esperanto”*.

Tiu ĉi konkurso, kies limdato por prezenti laborojn finiĝis la 31-an de decembro 2024, devas esti konsiderata granda sukceso, ĉar oni ricevis 38 laborojn el pli ol 20 landoj, nome: Kongo, Burundo, Nederlando, Madagaskaro, Anglio, Francio, Belgio, Litovio, Budapeŝto, Germanio, Kubo, Brazilo, Hungario, Filipinoj, Argentino, Meksiko, Italio, Luksemburgio, Kanado, Paragvajo, Irano kaj Hispanio (Alicante, Sevilo, Barakaldo, Reus, Valencio, Teruelo kaj Cheste).

La ĵurio, konsistanta el kvin membroj, proponitaj kaj elektitaj fare de la organizantoj, post trarigardi la ricevitajn laborojn kaj okazigi la koncernajn kunsidojn, publikigos siajn konkludojn, kun la elekto de la premiitaj laboroj, la venontan 4-an de aprilo. La solena premio-disdona ceremonio, kiu estos ĝustatempe anoncita, okazos la 25-an de aprilo en la salono de la Fondumo Cajacheste.

Dum la tuj-okazonta kongreso de HEF en Soria oni prelegos pri la konkurso, kaj estos anoncata la venonta okazigo de la konkurso, kiu okazos fine de 2025.

Denove, Esperanto metis Cheste sur la mondmapon.

Rafael Navarro Valle




ESPERANTO EN LA AMASKOMUNIKILOJ


Troviĝas nova sekcio en Bitoteko: *Esperanto en la amaskomunikiloj*, kiu aldoniĝas al la jamaj *Biblioteko* kaj *Gazetoteko*.

Tie kuniĝas nun la gazeteltondaĵoj, kiuj antaŭe konstituus kolekton de la sekcio *Biblioteko* kaj la aperoj en radio kaj televido, kiuj antaŭe respektive disis en la kolektoj de sonregistraĵoj kaj videoj, ambaŭ apartenantaj al la sekcio *Biblioteko*.

Tiel la organizo de tiuj specifaj dokumentoj estas pli klara kaj kohera kaj, krome, ties rekuperado rezultos pli facila



1 Nova sekcio de Bitoteko



2 Kolektoj de la nova sekcio

NEKROLOGE

Forpasis Renato Corsetti



UEA profunde bedaŭras informi, ke forpasis D-ro Renato Corsetti (naskiĝis la 29-an de marto 1941) la 1-an de februaro 2025, en la aĝo de 83 jaroj, en Londono. Eksa prezidanto de UEA (2001-2007) kaj honora prezidanto de UEA kaj TEJO, li estis multfaka kaj energia kunlaboranto kaj unu el la plej eminentaj figuroj en la esperantista movado, kaj en la itala kaj en la internacia, ekde siaj junaj ĝis siaj lastaj jaroj.

Naskiĝinta en Romo, li komencis sian profesionan karieron en banko. Li ekaktivis en la Esperanto-movado fine de la 1960-aj jaroj kaj baldaŭ poste iĝis Prezidanto de TEJO (1971-1973). La Estraron de UEA li unue eniris en 1980 kaj oficis ĝis 1986; denove en 1998 kiel Vicprezidanto kaj en 2001 kiel Prezidanto de UEA. Dum sia longa kariero en UEA

li aktivis en multaj komisionoj kaj kunlaboris en multaj projektoj kun aktivuloj tra la mondo, ekzemple en la Instituto Hodler '68, kie li estis Prezidanto (1980-1986) kaj Vicprezidanto (ekde 2002). En 2011, rekonante lian longdaŭran agadon por la Asocio, la Komitato de UEA deklaris lin Honora Membro kaj en 2023 nomumis lin Honora Prezidanto okaze de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Torino. Li ankaŭ ricevis la Premion Deguĉi en 2008. Krom siaj honoraj titoloj kaj premioj en UEA li ankaŭ estis Honora Prezidanto de TEJO.

En la pasintaj kelkaj jaroj li aktive kunlaboris por informa agado de UEA, kunordigante projektojn pri disvastigado de afiŝoj rilate al lingva justeco kaj okaze de la Esperanto-Tago kaj la Tago de la Gepatra Lingvo. Krome lia agado ne limiĝis en UEA kaj TEJO: li ankaŭ estis estrarano kaj prezidanto de Itala Esperanto-Federacio dum pluraj periodoj. Li estis elektita kiel membro de la Akademio de Esperanto en 1998.

Li estis lingvisto kaj profesoro, ofte prelegante aŭ verkante en Esperanto kaj en la itala pri lingva politiko, Esperanto, infana dulingveco, psikopedagogio de lingvo kaj komunikado. Li aŭtoris multajn artikolojn kaj librojn. Li instruis psikolingvistikon en la Universitato "La Sapienza" de Romo en la 1990-aj jaroj kaj estis profesoro de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) en San-Marino.

UEA perdis ne nur eksan prezidanton, sed ankaŭ gravan kunlaboranton, amikon kaj unu el la plej gravaj motoroj en la moderna historio de la Asocio. UEA esprimas siajn profundajn kondolencojn al la tuta familio, ĉefe al lia edzino Anna Löwenstein, mem honora membro de UEA kaj eminenta Esperanto-instruisto, kaj al liaj kvar gefiloj.

Gazetaraj Komunikoj n, 1212

INKLUZIVECO, DISKRIMINACIO KAJ HOMAJ RAJTOJ EN LA JUNULARO: PRIPENSOJ DE BUDAPEŝTO

De la 3-a ĝis la 7-a de februaro 2025, mi havis la ŝancon partopreni en studsesio ĉe la Eŭropa Junulara Centro en Budapeŝto. Organizita de TEJO en kunlaboro kun la Konsilio de Eŭropo, ĉi tiu renkontiĝo kunigis junulojn el diversaj landoj por pripensi Inkluzivecon, homajn rajtojn kaj diskriminacion. La studsesio estis kunvena spaco, loko kie ni dividis ideojn kaj spertojn. Temis ne nur pri lernado de konceptoj, sed pri sentado de la graveco de inkluziveco en nia ĉiutaga vivo kaj en nia socia rolo.

Dum la sesioj, per partoprenaj metodoj, ni laboris en grupdinamikoj, rolaj ludoj kaj aŭdvidaj projektoj. Ĉio ĉi ebligis al ni kompreni, el praktika vidpunkto, kiel inkluziveco estas vivanta kaj nepra procezo.

Por mi, ĉi tiu renkontiĝo konfirmis la gravecon enkonduki edukadon pri homaj rajtoj en la klasĉambron. Inkluziveco ne estas nur koncepto, sed praktiko, kiu devas trapenetri la instruadon kaj la manieron kiel ni interagis kun niaj studentoj kaj kreas spacojn, kie ĉiuj sentas sin valorigitaj.

Foriri el ĉi tiu studsesio kun novaj scioj estas valora, sed eĉ pli gravas la sindevido apliki ilin. Pli ol evento, ĉi tiu sperto estis memorigilo pri la graveco de edukado kiel ilo por socia transformo. Inkluziveco kaj homaj rajtoj ne estas nur debatotemoj, sed principoj, kiujn ni devas vivi kaj antaŭenigi ĉiutage.



Laura Esteban Gómez



IOM DA MATEMATIKO (17)

Kiel konstrui tunelon.




Ni imagu, ke oni planas konstrui rektan ŝoseon, kiu devos trairi monton. Tre ofte tio postulas konstruon de tunelo por faciligi veturadon de aŭtomobiloj.

Por ŝpari monon kaj tempon ofte oni komencas trabori la monton ne ĉe unu loko sed ĉe du montoflankoj, kiuj estos la du ekstremoj de la tunelo, t.e., oni konstruas du tunelojn, kiuj kuniĝos ie interne de la monto.


Tio, kio ŝajnas ege komplika problemo, estis jam solvata en la antikva Grekujo fare de matematikisto nomata

Eŭpalinos, en la 6^a jarcento a.K. Eblas insisteme diri ke, en tiu epoko, estis en Grekujo veraj geniuloj, kiuj trovis solvojn al multaj problemoj de la ĉiutaga vivo.


Ni vidu kiel rezonis Eŭpalinos:




Oni desegnu la bazon de la monto. Tunelo komencos en la punkto "A" kaj finos en la punkto "B". La problemo estas eltrovi la direkton de la rekta linio, kiu ligo "A" kun "B".



Komence oni konstruas la plurangulan linion (poligonon) APQRB, kiu iras de "A" ĝis "B" kaj tiel ke la anguloj en "P", "Q" kaj "R" estu ortaj (90-gradaj). Fari tion estas facila tasko.



Poste, oni elektas punkton "C" tiel ke la linio AC estu paralela al la linio PQ kaj ke la linio CB estu paralela al la linio QR. Tiun punkton "C" oni ne devas signali sur la tereno, nur teorie "surpapere".



Post tio, oni plilongigas la linion AB ĝis ĝi kuniĝu kun la linio PQ kaj same kun QR. La intersekco de la linioj AB kaj PQ ni nomu “Ĉ” kaj la intersekco de la linioj AB kaj QR ni nomu “Ĝ”.

Por fini, danke al geometria rezonado, kiu sekvas ĉi malsupre, eblos kalkuli la distancojn ĈP kaj ĜR. Sekve, la punktojn Ĉ kaj Ĝ. Kaj tiel, komenci la traboradon de la monto laŭ la direktoj ĈA kaj ĜB.

Nur por tiuj, kiuj interesiĝas pri la geometria rezonado:

Ni rigardu la lastan bildon. En ĝi, $AC = PQ - BR$

$BC = RQ - AP$

Alie, la ortaj trianguloj $BR\hat{G}$ kaj ACB estas similaj (en geometrio, tio signifas ke iliaj respektivaj anguloj estas egalaj kaj iliaj respektivaj lateroj, proporciaj).

Pro tio,

$\frac{\hat{G}R}{BC} = \frac{RQ - AP}{RQ - AP}$

$BR = AC = PQ - BR$ De tie, $\hat{G}R = PQ - BR \times BR$

Same kiel antaŭe, la ortaj trianguloj BCA kaj $AP\hat{C}$ estas similaj.

Pro tio,

$\frac{\hat{C}P}{AC} = \frac{PQ - BR}{PQ - BR}$

Jesús M. García Iturrioz

jmgiaa@hotmail.com

83a Hispana Esperanto-Kongreso



Soria 1a - 4a majo 2025
